

INTERLANGUAGE



# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

**"PEOPLES SPEAKING TO  
PEOPLES"**

**A WORLD INTERLANGUAGE  
NEEDED**

**ESPERANTO SOLVES THE  
PROBLEM**

**AMERIKA ESPERANTISTO**

*Oficiala Organo de la  
ESPERANTO-ASOCIO  
de NORD-AMERIKO*

**NOV-DEC, 1951**

*Twenty-five Cents*

## AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

(*Amerika Esperantisto*)

G. ALAN CONNOR, *Editor*

Vol. 65

114 West 16th Street  
New York 11,  
N. Y.

Nos. 11-12

*Associate Editors:* Dr. W. Solzbacher, Doris Tappan Connor, Dr. Norman McQuown, Dr. S. Zamenhof, V. Rev. Gabriel N. Pausback, Myron Mychajliw.

*Sustaining Board:* Dr. Luella K. Beecher, John M. Brewer, Olive Campbell, J.F. Clewe, Preston Davis, Jr., E.G. Dodge, R.E. Dooley, Harold Ewen, Dr. G.P. Ferree, Anonymous, Thomas Goldman, George Hirsch, H. F. Keller, Eulalia Marks, Tony Nabby, R. C. Palmer, D. B. Richardson, Tom Robbins, Beatrice Ruff, Mazah Schulz, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, Isabel Snelgrove, Francis H. Sumner, Adeline Vigelis, Anonima. Dr. F. E. Ballard, Dr. W. Solzbacher, Mr. & Mrs. A. Beintker.

*Office Assistants:* Lola Mae Muse, H.S. Harris.

### SUPER-QUALITY ESPERANTO CHRISTMAS CARDS

All-Esperanto design, wording and color—printed in Emerald Green and Bronze Blue, on 80 lb. "Fiesta" White Wove, Antique Finish Paper, with beautiful, wide, green deckle edges on both folder and envelope. The outside cover design consists of a large Esperanto Green Star, cleverly made up as Santa Claus. From Santa's right arm (one point of the star), a graceful ribbon floats down to spell out greetings in Esperanto (*SALUTON*). The wording inside, dignified and appropriate, is surmounted by a small green star, ending with the familiar greetings *Merry Christmas—Happy New Year* (all in Esperanto, of course)!

You will want to send your friends—here, there and everywhere—great quantities of these superb representatives of living Esperanto. The folders are double-folded, with envelopes to match, size  $4\frac{3}{4} \times 6\frac{3}{8}$  inches. *Prices:* (folders with envelopes, in complete sets) one for 25c; twenty-five for \$5.00; fifty for \$7.75; one hundred for only \$13—all postpaid.

**Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**

*Jarabono eksterlande, \$1.50 por kalendara jaro*

Make Checks Payable to *Esperanto Association of North America*

Minimum Membership in E.A.N.A.—\$3.00 per Year

Active Sustaining Membership — \$5.00 per Year

# AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 65

NOVEMBER-DECEMBER 1951

Nos. 11-12

## "A PADLOCK ON OUR LIPS"

CHARLES CHOMETTE

*(Letter in Los Angeles Times, Oct. 26, 1951.)*

**R**ECENTLY two large international gatherings took place, having about the same number of participants and nations represented. One was the peace treaty conference at San Francisco, the other was the Universal Esperanto Congress at Munich. Everybody read about the first but few heard about the second, and the press is to blame for neglecting to compare these two gatherings with regard to the language question.

In San Francisco the diversity of languages was a constant handicap among the statesmen. Their important speeches were understood in the original language by only a few, and the translations which were done while the speeches were made, could not possibly be made correctly and completely. It was in this atmosphere of confusion and misunderstanding that the peace treaty was signed.

At the Esperanto Congress, 2000 people coming from 40 different countries met for a week in an atmosphere of friendship and understanding which can exist only when all can converse in a common tongue. Eloquent speeches were made there, too, and these were understood by all, without interpreters and earphones. It was an inspiring experience for all present, including this writer.

It is unfortunate that all the world's statesmen were not there as spectators; it would have been a revelation to them. Surely if these 2000 people, coming from all walks of life, have been able to learn Esperanto, why cannot statesmen do the same thing?

If they cannot, then they admit they lack the intelligence; if they claim they have not the time, then they should forego some cocktail parties and the golf course to find the time; and if they claim they are too old to learn a new language, even an easy one, then what about the younger or the prospective statesmen?

A day surely will come when all the people of the world will understand one another through the medium of a common auxiliary language. Each of us may help to bring this day nearer.

If it is true that the real people of each nation want friendship, understanding and peace, why not now pull down the iron curtain of languages which keeps us in ignorance of each other?

Too long we have carried a padlock on our lips in our relations with peoples of other nationalities.

**A Medical Review in Esperanto** (*Medicina Revuo*) has resumed publication in Japan. The editor-in-chief of the magazine is *Professor Masao Suzuki*, Director of the Physiological Institute, Tiba, Japan. (Subscription is \$2.00 a year. Available through EANA.)

**A Mexican Esperanto Association**, with headquarters at Mexico City was formed recently. In the past Esperanto activities in Mexico were dispersed among a number of individuals and small groups.

**The International Ladies' Garment Workers' Union**, one of the important affiliates of the American Federation of Labor, mentions Esperanto classes in the report of its Educational Department for 1951.

When the **Catholic Association for International Peace** held its Twenty-Fourth Annual Conference at New York, November 10-11, the *Reverend John LaFarge, S. J.*, drew attention to the importance of Esperanto as an instrument of understanding among the peoples of the world and suggested that *Dr. William Solzbacher*, President of the Esperanto Association of North America, who was present at the meeting, be invited to say a few words on the subject. Dr. Solzbacher emphasized in particular the Esperanto petition to the United Nations and endeavors in connection with UNESCO.

**The new mayor of Vienna, Austria, Franz Jonas**, has been active in the Esperanto movement for many years and once was editor of an Esperanto monthly. He now uses Esperanto in conferences with visitors from abroad. One of these visitors, *Mrs. Patricia De Cleene*, of New Zealand, stated in a radio interview that she was strongly impressed by the facility with which the mayor of the Austrian capital conversed with her in the neutral interlanguage.

**An International Conference on Esperanto in Railroad Traffic** was held in Paris, France, with great success, in May. About 400 railroadmen from France, Great Britain, Italy, Germany, the Netherlands, Denmark, Sweden, Norway, Finland, Austria, and Switzerland attended the gathering. One of the subjects discussed was the preparation and publication of an international vocabulary of railroad terms. *The International Convention on Passenger and Express Traffic* and the *International Convention on Freight Traffic* already exist in Esperanto translations. Recently the Railway Administration of Finland published a small handbook "*A Key for Conductors*", containing phrases in English, Esperanto, French, German, Swedish and Russian.

## ESPERANTO FOR RELIGIOUS PURPOSES

**Religious literature in Esperanto** includes the Bible, several classical writings of the Buddhist and Confucian faiths, such books as Giovanni Papini's *Story of Christ* and Charles Dickens' *Life of Our Lord Jesus*, and hundreds of books and pamphlets advocating the beliefs and traditions of many creeds and denominations including Roman Catholics, Anglicans, Lutherans, Presbyterians, Friends, Unitarians, Universalists, Swedenborgians, Christian Scientists, Seventh Day Adventists, Jehovah's Witnesses, the Swedish Evangelical Mission Covenant, Spiritualists, Tolstoyans, Baha'is, Hebrews, Buddhists, Moslems, Hindus, Shintoists, and Confucianists.

**"The Birth of the Universalist Faith"** ("Naskiĝo de la Universalista Kredo") is an eight-page pamphlet in Esperanto, written and just published by *Commander Richard E. Lambert*, a member of our Association. The article presents in narrative form the results of researches by Mr. & Mrs. Lambert on the beginnings of the religious group known as the "Universalist Church". It was originally written in English and appeared in the magazine of the Women's Club of Plainfield, N. J. (Copies in Esperanto are available from EANA at 10 c each.)

**The Oomoto Faith**, a Japanese Shintoist sect, publishes for worldwide distribution a monthly magazine in Esperanto, *Oomoto*. In addition to spreading the religious ideas of its publishers, the periodical devotes itself to making Japanese art known in the outside world.

**A 400-page novel in Esperanto**, by Francisco Candido Xavier, has just been published by the Brazilian Spiritualist Federation. Its title is "*Antaŭ dumil jaroj*" ("Two thousand years ago").

**The International Christian Esperanto League (KELI)**, recently held a successful international conference at Markt-leuthen, Southern Germany, near the Czechoslovak border. The organization is strongest in Sweden, Finland, Norway, the Netherlands, Germany and Great Britain.

**In Japan** an Esperanto translation by Sindo Seitaro of the article, "The Case for Esperanto", by the Reverend John LaFarge, S. J., first published in the weekly magazine *America*, September 23, 1950, appeared in the May-July 1951 issue of *Esperanta Katoliko*. Extracts from the article and comments about it had previously been printed in the *American Esperanto Magazine*, *Espero Katolika* (Amsterdam, Netherlands) and *La Rondo* (Melbourne, Australia). One of the articles commenting on it in *Espero Katolika* was by Professor H. G. Wannemakers, S. J., of Indonesia, a member of the Jesuit Order like Father LaFarge. (Reprints of Father LaFarge's article, especially effective in Catholic circles, are available from EANA at 1¢ apiece.)

# ESPERANTO LITERATURE

## *Its Many Treasures and its Vital Importance*

*William Solzbacher, Ph. D.*



DECEMBER 15, birthday of Dr. L. L. Zamenhof, author of Esperanto — who would be 92 if he were alive — is celebrated throughout the worldwide interlanguage movement as the *Day of the Esperanto Book*. Every member and every supporter of our cause is urged to buy at least one Esperanto book on this occasion. This is the time to select good titles for winter reading.

Members of our movement are very proud of the fact that the literature of Esperanto consists of approximately 8000 volumes and that, by quantity, quality, and variety, it compares favorably with the literature of many national languages. Strangely, however, many of those who talk about Esperanto literature hardly ever read or buy the treasures which they praise.

Since most of those who have studied the language have more opportunity to read and write Esperanto than to speak it, the literature of the interlanguage plays a vital part in maintaining the stability and raising the efficiency level of the Esperanto movement. To a large extent it is through our literature that we can demonstrate that Esperanto possesses the precision, clarity and flexibility required for worldwide application in all fields of human endeavor. It is through reading that most of us become more fluent and adept in its use.

Since Esperanto literature is essentially international and designed to satisfy the demand of a worldwide market, its production and distribution is very sensitive to trade and currency restrictions of the kind that plague the postwar world. Publishing and bookselling are handicapped not only by the Iron Curtain which completely cuts off a large part of the market, but also by currency regulations which paralyze a huge potential market in such countries as Germany, Austria, and Japan. The United States and Canada are among the very few countries in which practically every Esperanto book not out of print can be supplied at the present time.

Esperanto books are not expensive in comparison to books printed in the English language. If you build up a small Esperanto library of your own, you will get a great deal of enjoyment out of it, and you will rapidly become more proficient in Esperanto. You also will get a thrill out of the variety and internationality of your treasures which are likely to include books published in Brazil, Sweden, Hungary, France, England, Finland, Japan, Germany, Denmark, Italy, Uruguay, Bulgaria, the Netherlands, etc.

Some masterpieces of Esperanto literature which you can readily buy at present are likely to become very rare in the future. For instance, almost the complete stocks of the famous *Literatura Mondo*

books, most of them of the highest quality, were shipped from Budapest to New York just before the iron curtain went down completely and brought Esperanto book publishing in Hungary to a standstill. Many of these books, now offered at very reasonable prices, may never become available again, once present stocks are exhausted.

By purchasing now as many Esperanto books as you can afford, you will render a real service to yourself, to your national Esperanto Association, which could not run its headquarters without income from the book trade, and to the worldwide Esperanto movement, which needs American dollars. You can choose from a wide selection of books, whatever your interests, your taste and your budget may be. The following lists contain just a few practical suggestions.

### GIFTS TO NON-ESPERANTIST FRIENDS

<b>Esperanto: The World Interlanguage</b> , Connor-Solzbacher-Kao, "6-books-in-1", student's complete manual, 250 pp., cloth...	\$ 3.00
The same complete manual as above, in glazed paper covers	1.50
<b>The Life of Zamenhof</b> , Edmond Privat, English translation, Esperanto and its author, 4 pp. photos, 123 pp., cloth.....	1.25
<b>The World's Chief Languages</b> , Mario A. Pei, with excellent chapter on Esperanto, a truly great work, 663 pp., cloth.....	6.00
<b>Universala Esperanto-Metodo</b> , Wm. S. Benson, 11,000 pictures, unique picture text, reader, dictionary, 560 pp., cloth.....	6.00

### STUDENT'S AND TEACHER'S BASIC LIBRARY

*(The above titles plus the following.)*

<b>Esperanto-English Dictionary</b> , Millidge, 490 pp., cloth.....	\$ 2.60
<b>English-Esperanto Dictionary</b> , Fulcher & Long, 360 pp., cloth	2.35
<b>Plena Vortaro de Esperanto</b> , all-Esperanto, 511 pp., cloth....	4.35
Rare deluxe ptd ed. of above, better paper & binding.....	6.75
<b>Plena Gramatiko de Esperanto</b> , Kalocsay & Waringhien, a few, Rare, 2nd ed. revised, 489 pp., deluxe paper, card bound....	12.00
Rare, 1st ed., 371 pp., on excel. book paper, card bound....	10.00
<b>Naŭlingva Etimologia Leksikono</b> , L. Bastien, 335 pp., cloth..	2.25
<b>Vivo de Zamenhof</b> , Privat, 12 pp. photos, 133 pp., cloth.....	1.25
<b>Originala Verkaro</b> , Zamenhof, deluxe bound, 605 pp., cloth....	5.00
<b>Leteroj de L. L. Zamenhof</b> , Waringhien, 760 pp. 2 vols. cloth.	6.75
<b>Historio de la Lingvo Esperanto</b> , Privat, 273 pp. 2 vols. card.	2.35
<b>Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado</b> , 64 pp., paper..	.65
<b>Enciklopedio de Esperanto</b> , Kökény-Bleier-Kalocsay-58 others, last few sets, 2 vols. illust., 1168 pp., over 1000 pictures:	
Rare, maroon leath. & gold, 2 vols. il., deluxe bound.....	20.00
Rare, same as above 2 vols. il., but with tan cloth bound....	18.50
Rare, same as above 2 vols. il., but with ptd paper covers..	15.00
Rare, same as above 2 vols. il., but with plain paper covers	13.50
Single Vol. II only, K-Z, 784 pp., 512 ils., cloth bound.....	7.00
Single Vol. II only, K-Z, 784 pp., 512 ils., paper covers....	6.00

## RELIGIOUS BOOKS FOR CHRISTMAS

<i>La Sankta Biblio</i> , The Bible, art vellum, 998 pp., cloth.....	\$ 2.50
<i>La Nova Testamento</i> , 3 1/8 x 4 7/8, 358 pp., leather-cloth....	.65
<i>La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo</i> , Dickens, art, 118 pp., cloth....	1.80
<i>Historio de Kristo</i> , Giovanni Papini, 605 pp., full cloth.....	3.50
<i>Fabiola</i> , Cardinal Wiseman, 32 ils., 444 pp., boards with cloth	3.50
<i>Infero</i> , Dante, <i>rare</i> , 14 art ils., 288 pp., corners & back cloth.	6.00
Same, but without ils., 288 pp., with plain card covers.....	2.75
<i>Bhagavad-Gîtâ</i> , Lorenz, fr. Sanscrit, 96 pp., art leatherette....	1.00

## FROM THE LITERATURE OF SMALL NATIONS

<i>Sveda Antologio</i> , Parts I & II in one volume, 432 pp., cloth....	\$ 5.00
Same, but in 2 vols., finer binding, 228 & 204 pp., cloth....	6.00
<i>Svisa Antologio</i> , from all 4 language groups, 540 pp., cloth....	6.00
Same complete Swiss anthology as above, but in card covers	4.35
<i>Ĉeĥoslovaka Antologio</i> , <i>rare</i> , 32 art wks, 500 pp., half-cloth..	7.00
Same complete Czech anthology as above, but in paper covers	4.50
<i>Hungara Antologio</i> , <i>rare</i> , 47 portraits, 482 pp., half-cloth.....	7.00
<i>Belga Antologio</i> , <i>rare</i> , 2 vols. Flandra/Franca, 582 pp., paper	5.00
<i>Bulgara Antologio</i> , <i>rare</i> , 16 portraits, 248 pp., paper covers...	2.50
<i>Kataluna Antologio</i> , J. Grau Casas, 416 pp., bound full-cloth.	5.00
Same complete Catalan anthology as above, but paper covers	3.85
<i>Sep Fratoj</i> , great Finnish story, 34 ils., 360 pp., in boards....	3.00
Same Finnish masterpiece by Kivi as above, but card covers.	2.50
<i>Gösta Berling</i> , Lagerlöf, 16 plates, 552 pp., deluxe, full-cloth	4.00
(This Swedish classic, 2 parts, bound in 1 superb volume.)	
<i>Ĉe la Sanktaj Akvoj</i> , Heer, Swiss story, 216 pp., half-cloth....	2.50
(This romance of Swiss mountains, 2 parts, in one volume.)	
<i>Ariel</i> , Rodó, classic of Uruguay, 3 ils., 157 pp., card covers.	1.65

## GEOGRAPHY, HISTORY, AND TRAVEL

<i>Kon Tiki</i> , Heyerdahl, 60 fotos, 236 pp., deluxe, full-cloth.....	\$ 3.90
<i>Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo</i> , ils., 151 big pp., leatherette...	4.00
Same richly il. large deluxe vol. above, but in card covers...	2.75
<i>Aŭstralio - Lando kaj Popolo</i> , ilustr., 96 pp., in art card covers	1.50
<i>Homaj Rasoj de la Mondo</i> , 144 il. human forms, 212 pp., paper	1.65
<i>Rigardu la Teron</i> , Van Loon, <i>rare</i> , ill. geography, tremendous	
book 1 1/2" thick, 157 il., 28 color plates, 185 pp., paper...	6.00
<i>Jarmiloj Pasas</i> , Haefker, orig., 4 bks in 1 great, impressive,	
deluxe volume, 6 plates, 11 maps, 506 pp., art half-cloth.....	4.00

## BEST IN POETRY, DRAMA, AND ART

<i>Dekdu Poetoj</i> , famed poems ed. Kalocsay, 127 pp., deluxe cloth	1.85
Same book of selected poems as above, but plain card covers.	.85
<i>Eterna Bukedo</i> , Kalocsay, fr. 22 languages, renowned vol. verse,	
few only, <i>rare</i> , excel. paper, 352 pp., in plain card covers....	7.00



<b>Dante: Infero</b> , rare, 14 art il., 288 pp., superb, half-cloth.....	\$ 6.00
Same, but without ilustr., 288 pp., with plain card covers....	2.75
<b>Streĉita Kordo</b> , Kalocsay, rare, 196 pp., plain card covers.....	2.00
<b>Johano la Brava</b> , Petöfi, 2nd ed., poetic fable, 65 pp., card...	.85
<b>Mia Spektro</b> , Kurzens, orig. & unique poetry, 64 pp., fine card.	.75
Same book of short, modernistic poems, but plain card covers	.50
<b>Romaj Elegioj &amp; La Taglibro</b> , Goethe, 2 erotic poems, art card	.85
Same, with same 7 art plates and 80 pp., but in plain card...	.65
<b>Tragedio de l' Homo</b> , Madách, 16 art plates, 266 pp., art card.	1.35
<b>Muzik-Notoj de Baghy-Kalocsay</b> , 34 pp., 10 pieces sheet music	.50
<b>Arthistorio</b> , Hekler, 112 plates (147 ilustr.), 215 pp., paper.....	3.50
<b>Pri l' Moderna Arto</b> , 64 plates, 35 pp. text, 100 pp., half-cloth	2.50
Same, complete with ilustr. as above, but in fine paper covers	1.65
<b>Pentroarto en Malnova Hungarujo</b> , rare, 102 il., 168 pp., card.	5.00

### THE MOST BEAUTIFUL ESPERANTO BOOKS

(Especially Recommended as Gifts)

The following sixteen books, outstanding for the quality of their contents and the beauty of their printing and binding, are particularly recommended as Christmas and New Year gifts – for yourself and for your friends:

*La Sankta Biblio*, art vellum; *Vivo de Nia Sinjoro Jesuo* (Dickens); *Originala Verkaro* (Zamenhof); *Enciklopedio de Esperanto*, deluxe maroon edition; *Plena Vortaro de Esperanto*, deluxe edition; *Infero* (Dante), half-cloth; *Sveda Antologio*, cloth; *Svisa Antologio*, cloth; *Ŝep Fratoj* (Kivi), boards; *Gösta Berling* (Lagerlöf), deluxe cloth; *Ĉe la Sanktaj Akvoj* (Heer); *Kon Tiki* (Heyerdahl); *Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo*, flexible leatherette; *Jarmiloj Pasas* (Haefker), particularly beautiful and impressive; *Dekdu Poetoj* (ed. Kalocsay), deluxe cloth; *Pri l' Moderna Arto*, half-cloth.

Two other good gifts suggest themselves in addition to the list of books given above: *Rare Collection of 25 Esperanto Keys* – Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japano, Malaja, Norvega, Persa, Portugalano, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda – \$2.75. And the perfect gift, the *Connor Correspondence Course* with 'Viny-lite' records – \$36 complete.

### ĜOJAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN NOVJARON



## ENDING A YEAR OF PROGRESS

**A**S your General Secretary, I wish to comment upon the significance of the report on the opposite page. The graph shows that we are gaining *new* members through our *Public Relations Committee* and the untiring efforts of a number of *active samideanoj*, — approximately fifty per cent more members than we gained two years ago. This is highly significant when we compare our growth with the unfortunate downward trend in several countries of Western Europe. Part of the answer is that America is assuming ever greater leadership in world affairs. But the immediate answer is that our Committee and our members are expending more time and money on the promotion of Esperanto.

It is unnecessary to point out that not *all* of these new members maintain their interest and their membership. This is a phenomenon experienced by all magazines and all organizations. But the important fact is that fewer members drop out than come to us each year. This means that we are steadily growing, — and if the trends continue we will attain to a thousand members in the coming year. This will be a proud achievement for EANA; when we realize that we had only about two hundred members just some eight years ago.

This growth has not come about without strenuous labor and sacrifice on the part of many who esteem their EANA. We may truthfully assert that our growth from now on will be largely dependent, in direct ratio, on the time and money given to our campaigns and our personal effort. We need the active assistance of *every* member. Surely many times the number of Esperantists shown on the accompanying page could, with a little effort, secure *at least one new member for EANA*. Won't you join in this friendly competition to gain new members?

For those who are not so situated as to make recruitment of new members readily possible, there is the *Sustaining Board* and the opportunity to make donations toward the work of the *Public Relations Committee*. In this way you supply "munitions" for the "front line" workers. The Association is deeply grateful to the members of the *Sustaining Board*. We hope to honor them in a future issue of *AE*. Will *YOU* respond with your decision to sacrifice at least *10¢-a-day to EANA*?

There are many other ways for helping, such as sending out the *PGL* and the '*Congressional Record*'. Also the writing of "Letters to the Editor", etc. We, at Headquarters, plan to increase our efforts, too. Beginning with the New Year, we plan to add the equivalent of *two more pages* to our *AE*, by enlarging its format. We find that while this will slightly increase our office labors, it will cost no more to print the larger size. In a word, if we all help in every way we can, the future of EANA and "Esperanto in America" will be assured. Sit down right now in the spirit of Christmas, and make a resolution for the New Year — "*I will join the Sustaining Board for 1952, and do everything possible to assure continued growth for EANA.*"

# The Esperanto Association of North America


## "EVERY MEMBER ENLIST A NEW MEMBER"

More members! More members! Every member enlist at least one new member! This has been the motto of your Public Relations Committee throughout the year. We have urged you to help secure new members for EANA by every means possible.

Some of you have responded wonderfully, but only a small minority compared to the total membership. Here is the latest list of those members who responded to the call of the Public Relations Committee, and added new members to their EANA: V. A. Lyman (5); D. W. M. Jenkins (4); J. Brewer (3); Lillian Fuller (2); D. Walton (2); and M. Starr, Adeline Vigelis, Dr. N. McQuown, J. A. Clarkson, J. Murray, E. Dodge, A. Brown, S. Docal, Mrs. M. J. Brady, one each. (There are undoubtedly a few others whose efforts have resulted in new members, but we were not able to trace the source directly.)

The drawing presented on this page shows the graphic results of united and concentrated activity by this small number of active members, plus the Central Office, and the special efforts of your Public Relations Committee. Definitely it shows progress, but think how very much more progress could be made if each and every one of us vowed to see to it that at least one new member were added to the EANA rolls through our combined efforts! The prospects for EANA and for Esperanto would be bright indeed.

With the beginning of a promising New Year, there are a number of ways in which you can fulfill your quota: (1) The most fruitful method, as shown by past experience, is writing a "Letter to the Editor" about Esperanto to your local or regional newspaper. Do not forget to insert the name and address of EANA, so that those interested may write for full, free information. (2) Send copies of the PGL 183 and 'Congressional Record' regularly to friends, acquaintances, teachers, students, etc., in your area. (3) Organize a study group, etc.





*Shinji Miyamoto*

## EMINENTA VIZITANTO EL JAPANUJO

En Oktobro alflugis al Usono *S-ro Shinji Miyamoto* el Kobe, Japanujo. *S-ro Miyamoto* estas direktoro de la *Saisei Kamfor-Kompanio*, kaj vizitas Usonon pro sia komerca afero. Li bone parolas Esperante, kaj diris, ke nur dank' al sia scio de Esperanto, li kuraĝis veni al Usono, kvankam li ne multe parolas angle. Kiam *S-ro Miyamoto* surteriĝis en San Francisco, li trovis grupon da samideanoj atentantajlin ĉe la flugkampo. Nuntempe li loĝas en New York, sed li baldaŭ vizitos aliajn urbojn

tra Usono. *S-ro Miyamoto* transdonis al ni de la Japana Esperanto-Instituto amikan leteron, parton de kiu ni plezure publikigas sube: Estimataj usonaj samideanoj:

En la komenco de septembro, ni aŭdis de nia membro *S-ro Taki...* raporton pri lia vizito al viaj urboj, precipe al *Spencer...*, kaj en la fino de la sama monato ni bonvenigis kun granda feliĉo membron de *EANA, S-ro Vathis*, kiu alflugis de Hong Kong al nia lando speciale por saluti nin en la nomo de la usonaj esperantistoj okaze de la 38a Japana Esperanto-Kongreso en Nagoya.

Tia kontakto faras grandan ĝojon al ni, japanaj esperantistoj, kiuj estas izolitaj de la Esperantujo de la mondo. Ni sentas do tre feliĉaj denove saluti vin per nia fervora membro, *S-ro S. Miyamoto...*

Malgraŭ duonizoliteco ni laboras ĉiam energie por nia komuna afero... Nun ni havas pli ol 2,000 membrojn... Tre notinde estas fervora inklino de natursciencistoj al nia lingvo... En pli ol 30 universitatoj kaj 50 mezgradaj lernejoj troviĝas esperantistaj grupoj...

Akceptu, karaj samideanoj, elkorajn salutojn de

Japana Esperanto-Instituto, — *Ŝibej Mijake*, Direktoro

(de paĝo 105)

Por trovi rimedojn por vivi.

Lastatempe li diris al mi:

Al mi vi demandis kion mi deziras. Kaj tuj mi respondis, "Mangaĵon!"

(Ho ve, mi atendis la kison!)

Karulineto, li daŭrigis, atentu...

Ĉi tiuj 'floroj grandigantaj' kiuj kuŝas sur tablo,

Ja estas tre belaj. Sed ilin mi manĝi ne povas!

Aŭ ĉu vi supozas, ke tiujn aĉajn, nekuiritajn

'foliojn kreskantajn' mi manĝus?

Kaj plie, mia karulineto, vi lasis estingiĝi la fajron!

Ho malvarmeĝo! Mi devas veturi al lando pli varma!

Ĝis revido! Ĝis kiam en poŝo mi trovos la monon...

Tiel li ja diris. Tial mi do ploras. Amen.




## EL LA POEZIO DE MALNOVA HAVAJO

**L**A malnovaj Havajanoj estis nature poeziemaj. Ili vivis proksime al la tero, intime ĝin observadis, — al ili ĝi tre plaĉis, kaj ĝin ili ĝuis, Plie, la lingvo mem, pro ĝia abundo de vokaloj, facile akordiĝas al la poezio. Sed en la poezio de Havajo, ne ekzistas ritmo, rimo aŭ strofo en la moderna senco de la vortoj. La poeto komencis rekte rakonti pri sia temo sen enkonduko, kaj, ni devas aldoni, ofte sen konkludo. Jen unu por ekzemplo:

### He Mau Mele Aloha

Polani po hewa i ka ua  
 Eleele panoa ke kuahiwi  
 Ka mauna o Leleane  
 He panepoo no Lanihuli  
 E haliu ana i ka makani  
 E ka makani e he ala!  
 Heaha kau e ka haao e ka ua  
 lei kamakahala  
 Ua makua i luna o Keki?  
 Ulu ka lau kaha ka pua  
 Maawe i ka ua o Nuuanu?  
 E ke anu e heaha la?



### Kanto de l' Amo

Ĉielo mallumiĝas.  
 Mallumigita de pluvo.  
 Kovrita de mallum' la montego,  
 Montego de Leleane.  
 Kapo de Lanihuli, turniĝinta,  
 Frontante la venton,  
 Ho Vento! Estas amorata!  
 Kion deziras? Ĉu la pluvon  
 Envolvante kamakahala-n,  
 Kiu maturiĝas super Keki?  
 Ĉu foliojn kreskantajn?  
 Florojn grandigantajn,  
 Nutritajn de l' pluvo de Nuuanu?  
 Ho Malvarmego! Kio ja estas?

Pri Havaja poezio diris la irlanda poeto, *Padraic Colum*: "Ĉiu Havaja poemo enhavas almenaŭ kvar signifojn: 1-e, la troveblan signifon de la vortoj mem; 2-e, la vulgaran aĉan signifon; 3-e, la mitologian historian topografian signifon; 4-e, la "Kauna" aŭ profunde kaŝitan signifon, konatan de nur plej malmultaj aŭdantoj." Kiel do interpretas ni la poemon? Jen nia penado.

Pri la 1-a, la signifo estas memevidenta, se la Esperanta traduko estas komprenebla. Pri la 2-a, ni restas silentaj, senforte ĝin preterpasantaj. Pri la 3-a, mitologie, oni devas konstati, ke en Valo Nuuanu ekzistis (kaj eble nun ekzistas) granda nombro da dioj kaj diinoj. Historie, tiu ĉi estas la loko kie la konkerinto *Kamehameha la Granda*, per sia forta armeo, venkis la defendintan armeon de *Oahu*. Topografie, ni nur diras ke "Nuuanu" estas kunmetita vorto, el kiu la "Nuu" signifas *monteta*, kaj la "anu", *malvarma*. Valo Nuuanu estas kaj monteta kaj malvarma. Sed pri la 4-a signifo de la poemo, la kaŝita signifo, ni devas iom cerbumi. Estas tre grava respondecado por doni la veran signifon al ĉi tiuj ĉiamdaŭraj vortoj. Jen la rezulto de nia cerbumado:

Mia Amato malproksimiĝas. Kaj mi, l'Amantino, ekploras  
 (aŭ plukas).

Kial?

Ĉar la monkesto malpleniĝas. Do, mia Amato eliris,

(al paĝo 104)

## ESPERANTO-KRONIKO

**Du novaj sukcesaj kursoj** de Esperanto estas organizitaj en New Jersey. En Trenton, en la Lernejo por Plenkreskuloj, proksimume 20 personoj aliĝis al la kurso. La kurson gvidas s-roj *Donald Bushaw* kaj *Howard Borden*. En Newark, s-ro *Donald Walton* gvidas grupon ĉiusemajne en la Y.W.C.A. Jam aliĝis al EANA du novaj membroj pro la laboro de s-ro Walton.

**D-ro A. Aleman Ruiz**, Prezidanto de la Esperantista Asocio de Kubo, sufiĉe ofte mendas de EANA la malgrandan broŝuron PGL 183. Lastatempe li skribis: "Ĉiufoje kiam nia propaganda broŝuro estas donata al persono parolanta anglan lingvon, ni aldonas ekzempleron de tiu multvalora broŝureto. Tiamaniere ni jam uzis 100 ekzemplerojn."

**En la "Boston Globe"**, la 23-an de Oktobro, aperis "Letero al la Redaktoro", skribita de s-ino *Lillian Fuller*. Laŭ s-ino Fuller, "Esperanto is a state of mind - the same as Boston". Ĉirkaŭ tiu alloga temo, ŝi lerte interplektis informojn pri Esperanto kaj la adreson de EANA. Jam aliĝis unu nova membro pro ŝia letero.

**Nuntempe troviĝas en Nord-Ameriko** Esperantistaj enmigrintoj el la sekvantaj landoj: Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, Jugoslavujo, Latvujo, Litovujo, Polujo, Ukrainujo. Preskaŭ ĉiuj tiuj kontaktis la Centran Oficejon kaj fariĝis aktivaj membroj de EANA. Ni kore bonvenigas ĉi tiujn samideanojn kaj ĝojas, ke ili trovis novan liberan hejmon inter ni.

**En Spokane, Washington**, la 14-an de Oktobro, geedziĝis s-ro *Francis H. Sumner* kaj f-ino *Jessie Ashworth*. S-ro Sumner estas unu el la fondintoj de la Subtena Komitato de EANA. Dum la dua mondmilito li estis en la usona armeo en Nord-Afriko, kaj tiutempe skribis interesan artikolon pri siaj aventuroj per Esperanto en Maroko. Al la nova paro ni deziras multan feliĉon.

**En la jaro 4000** ĉiuj sciencistoj uzos Esperanton por skribi siajn raportojn. Almenaŭ tion raportis Komandanto *Richard E. Lambert*. Li sciiĝis pri tiu interesa fakto de populara radio-programo nomata "La Jaro 2000", kiu aŭdiĝas ĉiusemajne de Stacio WOR, New York.

**La Esperanto-Klubo de Sacramento**, Kalifornio, regule kunvenas en la Vespera Lernejo de tiu urbo. Malgranda grupo studas Esperanton ĉiusemajne sub gvidado de f-ino *Belle Craig*. Nova ano de la grupo estas s-ino *Bertha Helmer*, kiu translokiĝis de Fargo, Nord-Dakoto, al Sacramento en Septembro ĉi-jare.

**La Internacia Federacio pri Ŝakludo per Korespondo** denove eldonas gazeton, nomitan "Mail Chess" (Ŝakludo per Poŝto). Laŭ raporto de la Usona Federacio pri Ŝakludo, tiu gazeto enhavas artikolojn en la angla, franca, germana kaj Esperanta lingvoj.

# MOZAIKO DE HONG KONG

William P. Vathis

Oficiale ĝi nomiĝas Victoria. Sed multe pli populare oni ĝin konas kiel Hong Kong. Tiu nomo, kiu signifas "*Dolĉa Haveno*", validas por la insulo kaj por la urbo, — entute la brita krona kolonio. Sur la landkarto, oni trovas ĝin je la sudorienta marbordo de Ĉinujo. Nuntempe la okuloj de la mondo ofte turnas sin al tiu loko. Trafe, kiel amiko jam skribis al mi, "Certe vi nun troviĝas en interesa parto de la mondo."



William P. Vathis.

Interesa tutcerte! Kiel ĉiuj scias, Hong Kong estas grava havenurbo. Krome, la haveno mem estas tre bela kaj pitoreska. Kiam oni supreniras unu el la montetoj oni vidas belegan panoramon de la haveno kun multspecaj ŝipoj, — batalŝipoj, jonkoj, pramoj, ktp.

Pri la klimato, oni povas diri, ke ĝi estas subtropika: multe da pluvo, multe da suno, kaj ege malseka. Ĉi-lasta estas por mi la plej doloriga. Feliĉe mi laboras en oficejo aerumita — alie mi ja ne kapablus ion fari. Kaj kiom multe mi ŝatus vidi la neĝon!

En Hong Kong estas multaj montetoj. Ili estas tre belaj, verdaj montetoj, sed ili malsimilas la montetojn al kiuj mi kutimiĝis en Usono, pro tio, ke ne kreskas arboj. La malmultaj arboj, plantitaj de la britoj, estas

preskaŭ sensignifaj. Bonan pruvon pri tio oni trovas, se oni promenas kaj serĉas ombron en kiu oni povus ripozi — estas netrovebla.

Kvankam la gravaj komercaj aferoj okazas sur la insulo de Hong Kong, granda parto de la popolo loĝas sur la ĉeftero, Kowloon, kiu nomo signifas "*Naŭ Drakoj*". Oni uzas la pramon por transiri, sed se oni estas elspezema oni povas dungi motorboaton je malgranda kosto por private transiri proksimume la unu mejlon da akvo. Dum la matenaj kaj vesperaj "okupataj" horoj, la homamaso ja similas la homamason je la kvina horo vespere en la subtervojo en New York.

Kaj la popolo iras tiom malrapide! La orienta marŝmaniero estas tiel, ke eĉ kiam oni iras mem malrapide, oni ankoraŭ iras tro rapide por la indiĝenoj. Pro la homamaso, ne estas eble preterpasi ilin. Pri unu afero mi estas certa — neniam venos de Hong Kong Olimpia venkinto en konkurso pri kurado.

Rondcifere, la loĝantaro de Hong Kong estas du milionoj da personoj. La granda plimulto kompreneble estas ĉinoj. Multaj estas rifuĝintoj de la ĉeftero kaj venis ĉi tien post la tielnomata "liberiĝo" de Ĉinujo. Kelkaj miloj da britoj estas ĉi tie kaj la aliaj naciecoj estas diversaj — portugaloj, francoj, kaj precipe usonanoj. Kiel junulo mi ne povas preterlasi la okazon sen atentigo pri tio, ke la ĉinaj fraŭlinoj ja estas ĉarmegaj. Ili belaspektas, havas bonan edukon, estas tre ĝentilaj. Renkontante tian fraŭlinon, oni ja spertas agrablan kuneston.

La plimulto da homoj en Hong Kong ne estas riĉa. Personoj, kiuj

iam vizitis la Malproksiman Orienton certe jam vidis ekzemple – la kuliojn ambaŭseksajn, kiuj ĉion kunportas per bambuaj stangoj, ofte nekredeblajn pezojn – la rikŝo-knabojn, kun fortaj kruroj kaj ofte nudaj piedoj – la almozpetegantojn, gevirojn kaj geinfanojn – kaj dum la nuna varmega vetero la nudajn kaj duonnudajn geinfanojn – la malpurecon, sed oni diras, ke Hong Kong, estante brita kolonio, estas pura kompare al la vera Ĉinujo – kaj la odorojn, la multspecajn odorojn. Tamen tia estas la vivo orienta.

La socia kaj kultura vivo de Hong Kong estas ege malriĉa. Por plezuro ekzistas ĉevalkuradoj, kiuj altiras grandajn homamasojn pro tio, ke aliaj sportoj malabundas. Ankaŭ oni havas multegajn koktelfestenojn. La alkoholo estas pli malmultekosta ol aliloke kaj oni do kaptas tiun favoran okazon por festeni tiel nomatajn koktelfestenojn.

Pri insektoj en la Oriento, ĉiuj ja scias. Sed mi neniam antaŭe vidis tiom da blatoj. Tutcerte, ne plaĉas al mi la ducolaj flugantaj blatoj, kiuj enflugas la ĉambron. Oni kutimiĝas al ili, ĉiuj diras – sed ne mi.

Okulfrapa afero, precipe por usonano, estas la granda nombro da personoj, kiuj havas servistojn. Tiuj servistoj nomiĝas "amah" kaj oni havas amah'ojn ĉiuspecajn – kuirejan, lavejan, ĝardenan, ktp. Ili ja estas tiom multnombraj kaj malmultekostaj, ke ĉiu okcidentano havas kelkajn. Efektive, lavi vestojn aŭ kuiru manĝojn mem estas preskaŭ nepenseble; "oni perdos vizaĝon", kio ŝajne estas la orienta maniero por konduki kiel la najbaroj, kaj tiu esprimo estas bona preteksto por edzino dungi kelkajn servistojn, se iel ŝi sentas sin mallaborema. Kaj plej mirige, la ordinara ĉina familio, kiu gajnas eble trionon aŭ kvaronon de la salajro, kiun mi gajnas, ofte havas amah'on por fari la laboron.

Malbona afero rilate al la amah'oj estas, ke infanoj estas kun siaj amah'oj pli multe ol kun sia propra patrino. Kaj ofte impresas min la fakto, ke la patrinoj ŝajne ne zorgas pri la infanoj. Efektive, ŝajnas, ke la patrino ĝojplene kaptas la okazon forigi sin de la infanaj ĝenajtoj, kaj lasas al la amah'oj prizorgi ilin. Videble la vera patrino amo velkas en tiu-ĉi loko.



Kaj oni ne povas vojaĝi sole, precipe dumnokte. La abundaj rikŝo-knaboj postkuras kaj petas kunporti vin. Ili ofte scipovas paroli nur kelkajn, almenaŭ tri anglajn vortojn. Unue, estas "hello". Due, ili diras "rikŝo" kaj se tio ne efikas, venas la tria vorto – "virino". Kaj ofte tio . . . ankaŭ ne efikas!

Verdaj montetoj ĉirkaŭas Hong Kong. Kaj verdaj steloj troviĝas sur kelkaj fiakroj – sed ne pro nia kara lingvo. Bedaŭrinde la verda stelo malforte brilas en tiu ĉi brita kron-kolonio. Malgraŭ la fakto, ke antaŭ la milito troviĝis forta grupo en Hong Kong, estas nun troveblaj nur kelkaj samideanoj. Oni esperas trovi aliajn Esperantistojn, sed tio ŝajne ne multe sukcesos pro la nuntempa maltrankvila politika situacio.



## KANADA INFORMO

**Du longaj kolonoj** de presita informo pri Esperanto aperis en la gazeto "The Enterprise", Willowdale, Ont. La artikolo estas skribita de *S-ro W.D.B. Hackett* de Lansing, kaj bone prezentas Esperanton kiel solvon de la mondlingva problemo.

**Leŭtenanto R.G. Lindsay** de la Reĝa Kanada Mararmeo, revenis al Halifax dum Septembro post longa vizito en Anglujo. En letero al la Centra Oficejo li skribis: "Mi tre ĝuis mian viziton kaj la vojaĝon, sed estas bone esti denove en Ameriko".

**S-ro R. C. Palmer**, Manitobo, membro de la Subtena Komitato de EANA, sendis leteron, kiu informas nin, ke li anticipas edziĝi en Marto de la sekvonta jaro. La fianĉino nun ankaŭ intencas studi Esperanton.

**S-ro Elven Bengough**, dum 40 jaroj Registristo de la Universitato McMaster en Hamilton, Ont., antaŭnelonge emeritiĝis. Lastatempe li skribis al EANA: "Estas nun 30 jaroj depost mi komencis interesiĝi pri la kara lingvo. Ĝi donis al mi grandan plezuron pere de ĝia literaturo, la eksterlandaj kontaktoj, kiujn ĝi ebligis, kaj ĝiaj Kongresoj. Unufoje ni havis en Kanado apartan asocion, kies Honora Prezidanto mi estis, sed tiu asocio estis taŭge anstataŭigita per EANA. Ŝajnas al mi pli bone, ke Kanadanoj subtenu nord-amerikan organizon ol penu krei nacian asocion, kiam la membraro estas tiel malgranda".

**El Calgary, Alberto**, fama rodeo-loko de la okcidentaj vakeroj (bovgardistoj), *S-ino Isabelle Brady* raportas, ke ŝi kaj du aliaj samideaninoj kunvenas en malgranda rondeto por ekzerci Esperante. Aliaj membroj de la grupo estas *S-ino Fred Faulkner* kaj *S-ino E. Grundsteins*, latvino, kiu enmigris Kanadon antaŭ unu jaro.

**Redaktora paĝo** de la ĵurnalo "Globe and Mail", Toronto, la 1-an de Oktobro, denove publikigis longan leteron de *S-ro D.W.M. Jenkins*. Utiligante raporton, ke Herbert Morrison, membro de la Brita Parlamento, anticipas tempon kiam estiĝos komuna civitaneco por ĉiuj popoloj de la Atlantika Komunumo, *S-ro Jenkins* emfazis la gravan lingvan barilon, kiu frontas la popolojn. Lia propono pri solvo estas kompreneble – Esperanto.

---

**S-ro Karl Stefan**, membro de la Usona Domo de Reprezentantoj el la ŝtato Nebraska, mortis subite en Washington la 1-an de Oktobro. Li estis amiko de Esperanto kaj dufoje enmetis artikolojn pri Esperanto kaj eĉ en Esperanto en la oficialan Kongresan Protokolon (*Congressional Record*), la 15-an de Junio 1949 kaj la 11-an de Junio 1951.

*S-ro Stefan* naskiĝis en Ĉekoslovakujo. Li scipovis 6 lingvojn. Dum la lastaj jaroj li estis precipe aktiva en la batalo kontraŭ la komunismo kaj en helpa agado por tiuj, kiuj suferis pro komunista subpremo en multaj landoj de Eŭropo kaj Azio.



## DEZIRAS KORESPONDI



*Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.*

**Brazilo.** Edgar Estrella, Caixa Postal 945, *Salvador (Bahia)*, serĉas perantojn por vendi al importistoj ĉiulande tropikajn varojn el Brazilo (tabako, kafo, kakao, ledo, koton, ricinsemo, ŝnurfibro ktp.)

**Japanujo.** Esperanto-Grupo de Hyogo Sanatorio, Sanda, *Hjogo-ken*. Fraŭlinoj kaj sinjoroj deziras korespondi.

**Japanujo.** S-ro Teruo Nakasuji, Mits-Esperanto-Klubo, Mits-Tyo, Ibo-Gun, *Hyogo-ken*. Dez. interŝ. pentraĵojn, fotojn, ilustraĵojn de gejunuloj por ekspozicio. Ankaŭ dez. kor. kun lernejestroj kaj urb-administrantoj pri komunaj urb-problemoj. Ni estas komisiitaj de nia urbestro por peradi korespondadon.

**Usono.** S-ro Simon Zemojda, 104 Prospect St., *Passaic, N. J.* Nova Esperantisto dez. kor. pri ĉiuj temoj kun la tuta mondo.

**Aŭstralio.** Ladislao Dusek, 278 Franklin St., *Adelaide, S. Australia*.

**Brazilo.** Jeova Ferreira, *Fruital (Minas)*; dez. kor. kun Usonanoj.

**Brazilo.** Adalberto Fonseca, Rua Dr. Jose Maria 908, *Rosarinbo-Recife*.

**Germanujo.** Max Brückner, Kirchstr. 27, (22c) *Oberkassel/Bonn*.

**Germanujo.** Roman Glückher, Brauneggerstr. 38, *Konstanz/a. B. 21-j.*

**Hispanujo.** D. Cebollero, Bureta 12-3°, *Zaragoza*; kun Usonanoj.

**Japanujo.** Hideo Arimatsu, Tsuiki-mura, Chikjo-gun, *Fukuoka-ken*.

**Japanujo.** F-ino Jōko Iŝiguro, Sugamo 7-1662, *Toŝima-ku, Tokio. 19-j.*

## EANA & UEA MEMBERSHIP DUES FOR 1952

The Association thanks you sincerely for your support during 1951 and requests that you send your 1952 dues soon. An early remittance would be very helpful and would avoid the extra office work of sending out reminders.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and all *Bulletins*. Your EANA membership automatically gives you "Associate Membership" (AM) in the UEA. You receive the coupons of the UEA and have a right to the services of Delegates throughout the world.

In addition, there are "Individual Membership" categories in UEA: the *Yearbook* is supplied for an additional \$1.25 annually; the *Yearbook* and the magazine *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$3.00 annually. Here are Membership Rates for 1952:

EANA membership including UEA	Associate of UEA	Yearbook of UEA	Yearbook & Esperanto
Subscribing member	\$3.00	\$4.25	\$6.00
Sustaining member	5.00	6.25	8.00
Patron member	10.00	11.25	13.00

## POPULAR ESPERANTO BOOKS

*The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity.*

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. Brief course of 64 pages .....	.25c
REED'S PRACTICAL GRAMMAR, Dr. Ivy Kellerman-Reed. Very complete beginner's text for self or classes, giving extensive examples, dialogue, etc. Offset reprint, with some pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with index. Original price 75c, reduced to less than half-price .....	.35c
PRACTICAL ESPERANTO, Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 entertaining illustrations for rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto with pictures. 160 pp. ....	.30c
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "Six-books-in-one": history, textbook, reader, world directory, and two dictionaries. All in one volume. 245 pp. ....Paper \$1.50; Cloth	\$3.00
UNIVERSALA ESPERANTO METODO, Dr. Benson. A rare wonder-book with 11,000 pictures, all-Esperanto, 560 pp. ....Cloth	\$6.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, Cox. A detailed analysis of Esperanto grammar, with examples. 371 pp. ....Cloth	\$1.50
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, Prof. Mario A. Pei. A guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> . 663 pp. ....Cloth	\$6.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's little pocket companion. Offset ed. 80 pp. ....	.25c
EDINBURGH DICTIONARY. Esp-Eng & Eng-Esp. Complete, in concise form. The very best small dictionary. 288 pp. ....Cloth	.85c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj al la Universala Vortaro de la Lingva Komitato". 490 pp. ....Cloth	\$2.60
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY. Latest edition including appendices of proper names and neologisms. Each meaning listed individually. 348 pp. ....Cloth	\$2.35
FUNDAMENTA KRESTOMATIO, Zamenhof and others. Model chrestomathy and literary guide. 472 pp. ....Paper bound	1.50
Rare ed., ptd 1924, royal blue cloth with gold .....	Cloth bound 2.50
KARLO, Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo from boyhood to marriage. 43 pp. ....	.25c
THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio). The best "Reader". Bound in blue, art vellum, 8vo, 996 pp. ....Cloth	\$2.50
ESPERANTO SORTIMENTO. Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42pp; <i>Lando de Arĝenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miserere</i> , music story, <i>Thais</i> , by Anatole France, (2-in-1) 66pp; <i>Rozujo Ciuniljara</i> , miracle of love, 48 pp. Each book 25c. Entire sortimento for only	\$1.00
INDIAN BEAD STARS. White ground, green star in center .....	.85c
GREEN STARS. White ground, gold trim, brooch or button .....	.50c

**Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**

## NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records  
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "Connor Course" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. *NOW*, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. And it's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "Connor Course" is compiled by experts. "Vinylite" recordings by Mr. and Mrs. Connor. *All* designed so you can *master* Esperanto.



The complete "Connor Course" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage*."
- (2) Eight complete "Vinylite" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow 'Study Guide' (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "Certificate of Achievement".

**FOR INDIVIDUAL STUDY:** The complete "Connor Course," as described above, will be sent postpaid for only \$36. **FOR GROUP STUDY:** Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete Study Guide. Delivered with a full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

**Doris Tappan Connor, 114 W. 16 St, New York, N.Y.**